



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 4-a de Decembro 2017

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Asaf Ĥefec, Dror Gaon, Gabi Zeevi.
Gastoj: Mikaelo, Lea, Joela

Protokolo de la antaŭa kunsido (6-a de novembro 2017) - sendita al la partoprenantoj.

1. Raportoj:

Hieraŭaj telefonvokoj de Yair Efrati kaj la sekvoj (Jehoŝua): Unue li proponis al ni ŝanĝi la lokon de la ZV – unu semajnon antaŭ la evento! (ni jam fiksis la daton multe pli longe, sed li subite akceptis alian peton por la loko!). Poste li proponis la saman daton, sed en alia, proksima loko – li promesis aranĝi pianon, ktp, “el propra poŝo”. Pro insisto de Jehoŝua li ekkoleriĝis, kaj minacis: “serĉu lokon por la venonta jaro!”. Joela vizitis la alternativan lokon. Ŝi konsentis aranĝi vendrede, - ni estu flekseblaj! (Lea: saĝaj, ne pravaj!) - kaj tiel ni esperu resti por la nova jaro. *Decido:* Jehoŝua parolos kun Efrati la venontan tagon, kaj proponos al li elekti inter la du eblecoj. Jehoŝua sciigos ĉiujn. Se la ZV estos vendrede – la estraranoj devos dividi la tel.numerojn de la membraro por la sciigoj. *Akceptita unuanime!*

2. Oficejo (Ŝlomo) – la lasta propono estis en bona loko kaj bona prezo – sed tro malgranda (21 m²). *Decido: unuanime kontraŭ tiu ĉi propono. Ŝlomo daŭrigos serĉi.*

3. Zamenhofa Vespero (Jehoŝua)

Mikaelo parolos en E-o, Amir Naor hebree, Eran pri la lernejo en Givatajim, kie li instruos E-on (eble li povos konvinki kelkajn gelernantojn veni al la ZV). Doron ludos pianon, Enrika kantos. Lea: kiel ne enigi prezentadon pri Zamenhof, ja ni estas en la Zamenhofa Jaro?! Jehoŝua: la propono venis tro malfrue, Matilda jam fiksis la programojn en la tempokadro.

4. Nia "estonto" en "Bejt-Horim WIZO" – ekserĉo de nova klubejo. *Ne traktita!*

5. La sorto de Esperanto-kurso en Tel-Avivo - kurso en Givatajim

Eran petis 50%-an rabaton por la lernantoj, por allogi ilin. Gabi: la sumo restu 400 NIS, sed ni ne petu anticipi la tuton, sed 100 NIS monate. Tio estas multe pli eltenebla, psikologie. *Decido: unuanime akceptata!*

La venonta kunsido: la 8-a de Januaro, 2018

Protokolis: Gabi Zeevi